

La lando de Region Maud (2)

Novelo de Zorja Danovskaja

Sub la piedoj degelis neĝo. De la maro blovis varma vento. Senvestaj malhelaj akcioj balanciĝis en la vento. Li kisis ŝin unuafoje en la bulvardo, kaj vento forskuis sur ilin aron da akveroj de interplektitaj branĉoj. Ili kuris, ridante, mano en mano, kaj la vento kuris por atingi ilin.

— Mia kapo estas tute malseka, — ridante diris Zinjo.

Ili enkuris iun pordegon. La urbo estis plena je muziko, ĉi nokte. Ĝi estis svingata el ĉiuj pordoj : patefonoj, radioriceviloj, pianoj... Aŭdigis kantado kaj rido. Ili staris, ĉirkaŭpreninte unu la alian, en la enirejo. Ial estis mallumo.

— Ĉu vi memoras ? Same, kiel tiam, — diris Zinjo.

Kiam ĉio iĝis tiel malbona kaj Zinjo konsideris la eventojn unu post la alia, ŝi rememoris en ĉiuj detaloj la novjaran nokton. Kiel bona ĉio estis ? Ili tiom bezonis unu la alian. Pasis multe da tempo, antaŭ ol ili komprenis : ili aliĝis, ili ne havas pri kio paroli, pensas pri diversaj aĵoj, ne kapablas gardi unu la alian...

Kvazaŭ neniam estus la malproksimaj jaroj de la lernejo, la multaj tagoj, pasigitaj kune. Kvazaŭ ili ne revis, ĉirkaŭpreninte unu la alian, sur la kanapo, pri foraj landoj kaj herooj. Foje ŝajnis al Zinjo ke ŝi estas kulpa, ke necesis agi alimaniere, sed ŝi ne povis kompreni, kio ĝuste necesas.

— « Ĉu vi memoras la Landon de Reĝino Maud ? » — per falinta voĉo demandis Zinjo, penante savi almenaŭ ion.

— « Vi estas stranga », — respondis Andreo — « Ni ja estas plenaĝaj homoj ». Andreo bone lernis. Somere de la jaro li foriris navigon. Kaj Zinjo finis la kurson. Ŝi estis sendota al granda fora konstruo. Ŝi ploris, petis permeson resti en la urbo, sed la prezidanto de la distribua komisiono, grizhara homo kun laca vizaĝo, respondis al ŝi malvarme :

— « Se vi ne volas tie labori, estas via afero. Sed du jarojn labori laŭ kondiĉo vi devas ».

La dekkvina de aŭgusto Zinjo devis jam aperi ĉe ŝia laborloko, sed Andreo ne revenis. Ŝi prokrastis sian elveturon, riskante havi gravajn malagrablaĵojn. Elĉerpiĝis ŝia mono. Ŝi kaŝis sin de la konatoj, timante demandojn.

Andreo venis nur je fino de aŭgusto. Plorante, Zinjo rakontis al li pri siaj aferoj. Andreo sidis malserene ĉe la fenestro. Li komprenis kion ŝi atendas. Li devis diri la lastan vorton. Li igis sin kompreni, kio ĝuste okazis. Li tiom amis ŝin, kaj jen nenio estas, nur indiferento.

— « Andreĉjo ! Kio okazis al vi ? vi estas tute alia ! » — ekĝemis Zinjo, alpaŝinte lin. Kaj ekploris ankoraŭ pli forte, kompreninte, ke ŝi atendis vane.

Kaj Andreo pensis pri tio, ke oni fidis al li difini la kurson de la ŝipo, kiel li revis rakonti ĉion al Zinjo, revenonte bordon. Ŝi renkontis lin en larmoj, malbela, malfeliĉa. Iu malbona sento simila al abomeno kreskis en li.

— « Vi iĝis fremda al mi », — ploris Zinjo. — « Sed vi ja diris, ke vi ĉiam amos min. Kiom multe promesis, Andreĉjo ! Kial do vi diris tion ? » Kion li povis respondi ?

— « Jen, Zinaida », — diris Andreo, ekstare. — « Mi jam ne amas vin. Mi ne scias, kial. Oni ne povas trudi la amon. »

— « Andreĉjo », diris Zinjo, — « eble mi vin ofendis iel ? Eble io estis ne kiel vi volis ? Diru al mi, Andreĉjo ! » — Ŝi ne povis paroli pro larmoj.

— « Mi ne plu havas, kion diri, ». Zinjo rigardis lin, kaj la rompita fiero splitis ŝian koron. Trafulmis la penso : kiel malbone aspektis la sceno dum la distribuo, kia honto ! Kaj li kaŭzis ĉion !... Sed ĝi jam havis nenian signifon.

— « Ĝis revido, Andreo, » — diris Zinjo firme. Li foriris, sed lia animo estis ankaŭ maltrankvila. Kaj Zinjo volis ĉeti ion terure ofendan al li postsekven, kvazaŭ ŝtonon, sed ŝi retenis sin, pensante nur : « Kial do ! Ĉu li kulpas, se li ĉesis ami ? Vere, amon oni ne trudas. Estas mia kulpo », kaj la koro dolo-